

# 100 jaroj

Jiří Kořínek

Tomáš Pumpr

La 18-a Internacia Kultura Festivalo

kune kun la 27-a Ĉeĥa-Saksa Tago

Ústí nad Labem, Ĉeĥio

de la 8-a ĝis la 10-a de decembro 2006.

# Enkonduke

La 18-a Internacia Kultura Festivalo kune kun la 27-a Ĉeĥa-Saksa Tago okazis en urbo Ústí nad Labem, Ĉeĥio, dum la 8-a ĝis la 10-a de decembro 2006.

Ĝi estis dediĉita al la centa datreveno de naskiĝo de elstaraj ĉeĥaj literaturistoj Jiří Kořínek kaj D-ro Tomáš Pumpr.

Vendreda vespero estis dediĉita al bonvenigo de la aliĝintoj, raportoj pri E-agado en la reprezentitaj E-kluboĵ, komuna kantado, prezentado de E-sorĉisto kaj amika babilado.

La ĉefa programo okazi sabate la 9-an de dembro.

En la prelega matineo eksonis prelegoj pri ambaŭ jubileuloj. Pri Jiri Korinek (1906-1988) parolis Prof. D-ro Vlastimil Novobilský, CSc. menciante lian kaj tradukan kaj originalan kreadojn. Al la kvindeko da aŭskultantoj li prezentis unuhoran sonbendan intervjuon kun J. Kořínek, kies enhavo ne nur reliefigis la tutvivan laboron de J. Korinek sur la literatura kampo, sed enhavis ankaŭ interesajn aktualajn konsideroj pri la stato de la E-movado antaŭ pli ol 20 jaroj kaj ankaŭ profetajn vortojn koncerne estontan vojon de nia lingvo.

Sekvis prelego pri D-ro Tomas Pumpr (1906-1972) en prezento de s-ano Jiri Patera el Praha, kompletigita de Miroslav Malovec el Brno. Ili ambaŭ aprezis elstaran rolon de Pumpr, kiu per siaj elstaraj tradukoj disvastigis konojn pri la ĉeĥa literaturo tra la E-mondo. Liaj tradukoj en Esperanton fariĝis krom tio lingvaj pontoj pere de kiuj ili estis tradukitaj ekz. en la lingvojn ĉinan, japanan ka.

Sabata posttagmenzo estis dediĉita unue al la spirita koncerto en la loka preĝejo de Sta Paulo, kiu enhavis jenajn punktojn:

*Motto: „ Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj – ni ĉiuj de Di’ estas filoj“  
(L.L.Zamenhof)*

## ***Spirita homaranisma koncerto***

*enkadre de la 18-a Internacia Kultura Festivalo  
en Ústí nad Labem, la 9-an de decembro 2006*

### **Programo:**

1. Sankta Venceslao – ĥoralo el la 11-a jarcento
2. Enkonduka vorto
3. C. Franck: Panis Angelicus
4. R. Wagner: Kanto al la vesperstelo ella op. Tannhäuser
5. N. Rimskij-Korsakov: Hinda kanto el op. Sadko
6. Neniun tuŝas mia misfart’ (migrula spiritalo)
7. Ch. Gounod: Ave Maria
8. A. Dvorak: Dum la patrin’ maljuna
9. L.L. Zamenhof: Preĝo sub verda standardo
10. P. Mascagni: „Ave“ el la op. Cavalleria rusticana
11. J. Suk: Melodio el la dramo Radúz kaj Mahulena
12. G. Verdi: ĥoralo el la opero Nabucco
13. C.M. Weber: Preĝo el la op. La sorĉpafisto
14. Preĝo al la Sundio (indiana kanto)
15. F. Moricone: Melodio el la filmo „Tiam en okcidento“
16. W.A. Mozart: Alleluja (el motteto Exultate, jubilate).
17. Adeste fideles (mezepoka adventa kanto)
18. A.L. Webber: Pie Jesu

### ***Plenumantoj:***

*Katerina Kudlíková – n-ro 3, 7, 10, 13, 16, 18*

*Miroslav Smyčka – n-ro 1, 2, 4, 6, 9, 12, 14, 17, 18*

*Jan Duda – n-ro 4, 5, 8, 11, 15*

*Ludek Trsek – orgena akompano*

La ĉefa kultura programo okazis sabate vespere en la neordinare bela salono de la urba muziklernejo de Eva Randova en Ustí nad Labem. La artisman programon kompilis preparis Miroslav Smyčka kaj realigis gin en Esperanto profesiaj kantistoj kaj muzikistoj el Praha, Brno, Olomouc kaj Ustí nad Labem. La aktoroj rikoltis merititan aplaŭdon de la entuziasmaj spektantoj.

La programo estis tiel ŝtopita, ke mankis tradia kolektiva kantado de kristnaskaj kantoj en traduko de J. Kořínek.

Dimanĉe la 10-an de decembro okazis ekskurso al monteto Ostry, kiun poezie prikantis J. Kořínek. De ĝia pinto oni povis spekti la urbon kaj majestan fluon de rivero Labe/Elbe fluanta al la Balta maro.

Dua parto de la partoprenintoj veturis trajne al banurbo Teplice, trarigardis ĝian centron kun famaj kuracdomoj, kie ripozis aŭ kuracis sin ekz. Goethe, A. von Humboldt, Beethoven kaj multaj aliaj. Ili vizitis ankaŭ Beuron-kapelon pri kies renovigo mirinde aktive zorgas la lokaj gimnazi-studentoj

De tie la ĉeestintoj forveturis hejnen, bedaŭrante, ke verŝajne la 18-a Internaci Kultura festivalo estis la lasta, kiun organizis fakte nur tri personoj: Miroslav Smyčka, Vlastimil kaj Věra Novobilský..

# 100-jara jubileo de Kořínek kaj Pumpr



**Jiří Kořínek** naskiĝis la 1-an de oktobro 1906 en Liberec kaj mortis la 4-an de novembro 1988 en Ústí nad Labem. Komence li laboris kiel komerca komizo en Liberec, ekde 1931 en tekstila grandkomercejo en Brno, dum la Dua mondmilito devige laborigita en fandejo. Post la milito li revenis al sia origina profesio, en 1964 li transloĝiĝis al Ústí nad Labem, kie li laboris ĝis sia pensiuliĝo kiel kontrolisto de kvalito en la entrepreno Textil Liberec.

En 1922 kiel studento li konatiĝis kun Esperanto. Ekde 1949 ĝis siaj lastaj tagoj li dediĉis milojn da horoj al pacienca laboro de tradukanto. Multegaj tradukoj estas dissemitaj tra gazetararo aŭ en manuskriptoj. Plej laste en la Régulo-festlibro Esperantismo li taksis sian verkaron kiel 500 originalajn kaj 550 tradukitajn poemojn kaj muziktekstojn. Nur ono el tio aperis libroforme. Li havas ankaŭ lokon en Esperanta antologio (1984) kaj en multaj revuoj, i.a. kiel gajninto de 18 literaturaj premioj. Nur du semajnojn antaŭ la morto Jiří Kořínek fariĝis la unua esperantisto, kiun la ĉeĥa ŝtato honorigis kiel "merithavan laboranton en kulturo".

Inter liaj originaloj elstaras poemoj *Doktor Zamenhof*, *Romanco f-majora de Beethoven*, *Skizoj de Usedon* kaj eseoj *Problemoj de tradukado*, *Taskoj de nia literaturo beletra kaj faka*, *Esperanto kaj poezio*, *Reguloj de Esperanta fonetiko*.

Li tradukis poezion de ĉeĥaj kaj slovakaj poetoj kaj ariojn el operoj. Liaj plej ampleksaj tradukoj estas *Panjo* (J. Seifert), *Manon Lescaut* (V. Nezval), *Jakobeno* (Červinková /Dvořák), *Flugilhava ŝtono* (J. Karen), *Sur la sojlo de amo* (M. Procházková).



**JUDr. Tomáš Pumpr** naskiĝis la 2-an de oktobro 1906 en Dolní Slověnice kaj mortis la 10-an de septembro 1972 en Prago. Esperantisto li estis ekde 1926, sian literaturan verkadon li komencis per kunlaboro al la *Ĉeĥoslovaka antologio* (Budapest, 1935), post kiu sekvis *Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj* de K. J. Erben (1938). Plej grandan admiron ĝis nun vekas lia genia repoemigo de *La bapto de caro Vladimír* de K. Havlíček Borovský, en kiu li sukcesis redoni la satiran humuron de la originalo utiligante proprajn kvalitojn de Esperanto. Alia poemigo de Havlíček *Reĝo Lávra* en lia traduko aperis en La Nica Literatura Revuo (31-32, 1960) kaj lia traduko de *Majo* de K. H. Mácha aperis fragmente en diversaj revuoj, komplete nur en 1997 (deklarita de R. Rossetti kiel nekompareble supera al la angla traduko).

Por la *Simpozio pri ata/ita* redaktita de Kálmán Kalocsay li verkis 106-paĝan traktaton *Esperanto sen aspektoj?* (Stafeto, 1961). Li kunlaboris teksto-traduke kaj nomenklature ĉe la eldono de *Poŝatlaso de la mondo* en Esperanto (1971) kaj tradukis la informan broŝuron *Mallonge pri Ĉeĥoslovakio* (1966). El Esperanto li ĉeĥigis la *Konstitucion de Japanio* por la ministerio de internaj aferoj. Post la Dua mondmilito Pumpr kunlaboris kun la esperantlingvaj art-elsendoj de la Verda Stacio Praha per vico da tradukoj ekz. *Somera firmamento* de Z. Jirotko (1948), *Gracoplina Jesu-Infano* de Prago de Fr. Kožík, *Fantomo en la kastelo* de M. Šrámek, ambaŭ en 1948, *Maja fabelo* de V. Mrštík (1950). Inter ili elstaris tradukoj de la oper-tekstoj de *Vendita fianĉino* de Sabina (muziko B. Smetana) kaj *Najado* de J. Kvapil (muziko de A. Dvořák) kaj *En la putro* de Sabina (muziko V. Blodek). Por la nacilingva programo de la radiostacioj Praha kaj Ostrava d-ro Pumpr enĉeĥigis la nederlandan dramon *La mondo ne havas atendejon* de M. Dekker el esp. traduko de F. Faulhaber.

En 1962 li fariĝis akademiano.

**Kunlaboro.** Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr pri kelkaj tradukoj kunlaboris. Ankoraŭ kun Rudolf Hromada ili esperantigis *Sileziajn kantojn* de Petr Bezruč kaj en manuskriptoj konserviĝis iliaj tradukoj el la plej malfacila el la ĉeĥaj poetoj Otakar Březina. Jiří Kořínek elĉeĥigis 20 liajn poemojn, Tomáš Pumpr 8.

# Antaŭ cent jaroj naskiĝis d-ro Tomáš Pumpr

Antaŭ cent jaroj naskiĝis la elstara ĉeĥa esperantisto, poeto, poemtradukanto kaj esperantologo JUDr. Tomáš Pumpr. Li naskiĝis la 2-an de oktobro 1906 en Dolní Slovénice apud Třeboň. Post siaj universitataj studoj li fariĝis juristo kaj ŝtata oficisto.

Kun Esperanto li konatiĝis en la jaro 1926. Sur la Esperanta literatura kampo li debutis per prozaj kaj versaj tradukoj por „Ĉeĥoslovaka Antologio“ (1935). En la jaro 1938 aperis libroforme lia traduko de „Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj“ de K. J. Erben, kaj la operon „Najado“ de Ant. Dvořák en lia Esperanta traduko elsendis la Verda Stacio Brno la 3-an de oktobro 1938.

Li kontribuis al gravaj literaturaj gazetoj: Literatura Mondo, La Nica Literatura Revuo (kies redakciano li estis), Esperantista, Norda Prismo, Paco k. a. Li fariĝis membro de Akademio de Esperanto, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, estro de Literatura Komisiono de EAĈSR, membro de Ekzamena Komisiono.

Liaj originalaj poemoj aperis en gazetoj kaj kelkaj estis envicigitaj en la Esperantan Antologion de W. Auld. Sed elstaraj estis liaj tradukoj de poeziaĵoj. Krom la jam menciita „Bukedo“ de Erben li tradukis „Majo“ de K. H. Mácha, „Bapto de Caro Vladimir“ kaj „Reĝo Lavra“ de K. Havlíček-Borovský kaj „Sileziaj Kantoj“ de Petr Bezruč kunlabore kun Jiří Kořínek kaj Rudolf Hromada. En manuskripto restas antologio el la poezio de Otokar Březina, ĉe kiu li kunlaboris kun Jiří Kořínek.

Por la Esperantaj elsendoj de Ĉeĥoslovaka Radio li tradukis kaj adaptis kunlabore kun d-ro Josef Fousek la operojn „Vendita Fianĉino“ (K. Sabina/B. Smetana), „Najado“ (J. Kvapil/A. Dvořák), „En la Puto“ (K. Sabina/V. Blodek) kaj multajn ariojn kaj klasikajn kantojn. Li esperantigis ankaŭ ĉeĥajn popolajn kantojn kaj por la radio-elsendoj li tradukis multajn literaturajn verkojn, ekz. „Fantomo en la kastelo“ de M. Šrámek, „Gracoplena Jesu-infano en Praha“ de Fr. Kožík, „Somera firmamento“ de Zd. Jirotko, „Maja fabelo“ de V. Mrštík k. a. Laŭ postulo de la Radio li ĉeĥigis el Esperanto la teatraĵon „La Mondo ne havas Atendejon“ de la nederlanda aŭtoro M. Dekker (la Esperanta traduko estis de F. Faulhaber, la Ĉs. Radio elsendis la teatraĵon en 1956).

Ĉeĥaj esperantistoj havas grandajn meritojn pri tio, ke ili uzis Esperanton kiel pontlingvon por popularigo de la ĉeĥa literaturo en eksterlando. Pri tradukoj de ĉeĥaj literaturaĵoj pere de Esperanto en aliajn naciajn lingvojn d-ro Pumpr prelegis en la Internacia Konferenco, organizita de Asocio de ĉs. verkistoj en Opava en la j. 1967. Ĉar temis pri internacia konferenco aranĝita honore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Petr Bezruč, la ĉefan atenton d-ro Pumpr dediĉis al la tradukoj de poemoj de Petr Bezruč. En la j. 1948 aperis en Ĉinio poemlibro prilaborita de Kuai Huan „Elektitaj poemoj el Ĉeĥoslovakio“, kiu enhavis kvar poemojn de Bezruč, en la j. 1961 aperis en japanlingva antologio de la monda literaturo, preparita de Kurisu Kei, sep poemoj de Bezruč. Poste aperis la kompleta poemaro „Sileziaj Kantoj“ en la ĉina tradukita el Esperanto fare de Li Laojon.

Sed el Esperanto estis tradukitaj ankaŭ verkoj de aliaj ĉeĥaj verkistoj. Ekz. en la ĉinan lingvon multajn verkojn tradukis esperantisto Li Laojon, kiu eĉ komencis lerni la ĉeĥan lingvon. Li ĉinigis la novelaron de Jan Drda „Muta barikado“, la poemaron de Marie Pujmanová „Ĉina rideto“, la poemaron de Svatopluk Čech „Kantoj de sklavo“ el manuskripta esperantigo de Tomáš Pumpr mem, „Bukedo“ de Erben kaj la jam menciitan poemaron „Sileziaj kantoj“ de Bezruč.

En la japanan lingvon la verkon de Jan Herben „Malriĉa knabo, kiu gloriĝis“ tradukis Aitaroo Jamanoi, multajn aliajn verkojn, kiel de Drda „Muta barikado“, de Čapek „Rakontoj el unu poŝo“, de Fučík „Riporto skribita en la pendumila maŝo“, de Hašek „Aventuroj de brava soldato Švejk“, de Havlíček-Borovský „Bapto de caro Vladimir“ kaj multajn aliajn japanigis Kurisu Kei, kiu ankaŭ mem ellernis la ĉeĥan lingvon kaj nun estas rekonata bohemisto en Japanio.

Diversaj aliaj poemoj kaj rakontoj aperis en gazetoj en kelkaj aliaj lingvoj, ekz. en la dana, estona, litova, malta kaj aliaj. Nekontestablajn meritojn tiudirekte havis d-ro Pumpr mem, ĉar ankaŭ liaj laboraĵoj servis por tradukoj en aliajn lingvojn.

„D-ro Pumpr en siaj tradukoj sukcesis redoni ne nur fidelan enhavon de koncerna originala verko, sed ankaŭ mirinde fidele transkomponi en sian tradukon la internan atmosferon, dinamikon kaj poezion de la originalo. Majstre li venkis ŝajne nevenkeblajn specialaĵojn de la nacia lingvo kaj prezentis al la legantaro tradukojn freŝajn, sukajn kaj tamen surprize simplajn. Tiu ĉi fakto estis

konsenkvenco de lia profunda kaj intima kono de Esperanto. Tiurilate estis d-ro Pumpr la plej aŭtoritata lingva kompetentulo en Ĉeĥoslovakio kaj pro sia prilingva klereco estis en 1962 elektita kiel membro de Akademio de Esperanto“ skribis pri li prof. d-ro Vlast. Novobilský kaj daŭrigis: „En pluraj fakaj studoj li science traktis problemojn de la Esperanta gramatiko (ekz. 106-paĝa traktato „Esperanto sen Aspektoj?“ en la libro „Simpozio pri –ata/-ita“, La Stafeto 1951). Grava estis lia kontribuo al aperigo de „Poŝatlaso de la Mondo“ en Esperanto (1971). Li tradukis la tekstojn kaj zorgis pri la lingvo ĝenerale.“

La poeto Jiří Kořínek karakterizis lin jene: „Liaj lingvaj studoj kaj eseoj havis altan nivelon kaj estis ĝuiga legaĵo. Sed li pleje famiĝis per siaj majstraj literaturaj laboroj kaj tradukoj el la ĉeĥa poezio. Li regis plurajn lingvojn, inter ili la latinan kaj grekan kaj ĉe siaj kolegoj juristoj li estis admirata pro sia brila lingva stilo, unika memoro kaj profunda scio el multaj sferoj. Parkere li sciis reciti el la gloraj latinaj poetoj kaj el la greka poezio.“

„Sed kiu lin konis persone, devis antaŭ ĉio ekŝati kaj aprezi lian homan karakteron. Afabla, helpema, ekstreme diligenta, senkompromise kaj honeste staranta ĉe sia konvinkigo eĉ kiam tio signifis rezignon pri certa kariero kaj oferon por li kaj lia familio. Iam en pezaj cirkonstancoj li ĉiam optimisme trapersistadis. Li estis modela kaj sinofera edzo kaj patro. Ĉe siaj enormaj kapabloj li estis ekstreme modesta“, skribis pri li Jiří Kořínek.

D-ro Tomáš Pumpr forpasis post mallonga suferiga malsano la 10-an de septembro 1972 en Prago. En kondolencna letero al ĉeĥaj esperantistoj la tiam prezidanto de UEA d-ro Ivo Lapenna skribis interalie: „Per sia grandioza verko D-ro Pumpr plu vivos en la Esperanto-Movado kaj lia nomo ĉiam estos alte respektata kaj honorata.“

Kaj la granda Esperanta poeto kaj verkisto Kolomano Kalocsay skribis en „Hungara Vivo“ jenon: „La granda perdo, kiun la E-a mondo, precipe la ĉeĥa E-a vivo suferis per la morto de akademiano Tomáš Pumpr, estas speciale dolora al mi, lia malnova amiko. Jes, ĉar kvankam ni neniam renkontiĝis persone, nin interligis longa, pli malpli regula kaj pli malpli pasia korespondado. Li estis ideala diskutanto, lertega skermanto, povanta plezuri pri lerta finto de sia kontraŭulo kaj povanta riposti kun lerto plezuriga. Sed la ĉefa afero por li estis la trovo de la vero. Ĉi tio prilumigas lian tutan personecon: li estis altgrade objektiva amanto de korekta ludo, de batalo ĉiam por afero kaj neniam kontraŭ persono. En mia „Vojaĝo inter la tempoj“ laŭ lia konsilo mi forstrekis kelkajn frazojn iom tro akritigitajn kontraŭ personoj...“

Ekzistas personoj, kiuj, eĉ se ne renkontataj, estas al ni valoregaj jam per tio, ke ili ekzistas, ofte pensataj memorataj amindaj individuoj, kies bonvola kritiko kaj ĉiama helpopreto estas nepre konfidinda. Tia estis nia Tomáš Pumpr, kaj kiam li, laboranta en sia profesio de juristo ankoraŭ en sia 66-a jaro, mortis en Praha la 10-an de septembro, mi kaj certe multaj kun mi sentas, ke per tio ni fariĝis pli malriĉaj, ke la ĉarmo senteble malpliĝis en la mondo.“

Malsame al Kolomano Kalocsay mi havis la bonŝancon renkontiĝi kun d-ro Tomáš Pumpr kaj aŭdi lian rakontadon, ĝui lian eminentan Esperanton.

Unuafoje tio okazis iam en la komenco de la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Tiam mi ankoraŭ loĝis en la urbo Most, cetere mi ofte vizitadis la kunvenojn de la E-klubo en Teplice kaj ankaŭ en Ústí n.L. kaj mi havis la honoron renkonti ĉi tie la neforgeseblan samideanon Jiří Kořínek. En Prago mi havis tiam geonklojn kaj mi tre ŝatis almenaŭ unufoje jare por kelkaj tagoj viziti ilin, fakte nian ĉefurbon. Mi ĉiam antaŭe preparis min por kiel eble plej multe vidi el Prago, el ĝiaj historiaj monumentoj kaj arĥitekturaj vidindaĵoj. Kaj mi samtempe utiligis la ŝancon por ankaŭ viziti la kunvenon de la Esperantista Klubo en Praha.

Tiutempe la klubo havis la kunvenojn en la strato Ve Smečkách, en la ejo, kie nun troviĝas la Ĉinoherní klub (Drama klubo). Tie estas sufiĉe granda salono, kie tiutempe kunvenadis kelkaj dekoj da pragaj geesperantistoj, eble inter kvindek kaj okdek. Nuntempe la praga klubo kunvenas en la sama strato, sed ĉe la kontraŭa flanko, en la kunvenejo de kvartala oficejo, kiu kunvenejo aspektas plena, kiam venas tien kutime dek du ĝis dek kvin esperantistoj.

Sed tiam – en la sesdekaj jaroj, en la plenega kunvenejo – aperis d-ro Tomáš Pumpr kaj prelegis pri la granda literatura projekto de Kolomano Kalocsay, nome pri granda antologio de tutmonda poezio, kiu estis ampleksonta poeziaĵojn de ĉiuj nacioj, ekde la plej malnova tempo de Egiptujo, Babilonio, Sumero, antikva Grekio, Romia Regno tra la mezepoko ĝis la nuna tempo. Kaj

specimene li deklamis fragmentojn el la granda sumera eposo pri la reĝo Gilgameŝ, en la Esperanta traduko de Kalocsay. Kiam mi vizitis lernejon, tiam ni lernis iom pri Egiptujo, pri Grekio kaj Romio, sed nenion pri Sumero, Akadio kaj aliaj, kaj mi povas diri, ke tiam, en la kunveno de la praga klubo mi ne nur unufoje vidis kaj aŭdis D-ron Pumpr, sed mi ankaŭ unufoje aŭdis pri Gilgameŝ. Kiel utile estas viziti Esperantajn kunvenojn, precipe se tie prelegas D-ro Pumpr.

La dua mia renkontiĝo kun D-ro Pumpr estis en Opava, en la jaro 1967, dum la Kultura Festivalo honore al Petr Bezruč. Tiu festivalo havis ankaŭ la Esperantan parton kaj D-ro Pumpr prelegis ankaŭ tie. Sed mi pli bone memoras lin, kiam ni festivalanoj partoprenis la ekskurson en la skansenon en Rožnov pod Radhoštěm kaj tie ni povis vidi la malnovajn vilaĝajn dometojn kaj iliajn ekipaĵojn, meblojn, diversajn laborilojn, vazojn, ujojn, vestojn ktp. La tiea ĉiĉerono klarigis ĉion detale ĉeĥlingve kaj lerta esperantisto interpretis ĉion por la ĉeestantaj eksterlandaj samideanoj. Sed la ĉeĥaj specialaj vortoj kaj la nomoj de diversaj objektoj estis tiom abundaj, ke la interpretisto fine rezignis kun konstato, ke ne eblas ĉion diri esperantlingve. Tiam D-ro Pumpr per la kubutoj liberigis al si la vojon antaŭen kun indigno: „Kion ne eblas diri esperantlingve? Ĉion eblas diri!“ kaj li tuj fulmrapide montris al la diversaj tasoj, teleroj, potoj, pelvoj, kruĉoj k.a. sur la tablo kaj nomis ilin ĉiujn esperantlingve. Kaj poste ankaŭ la diversajn agrikulturajn ilojn en la stalo, en la korto ktp.

Forveturi el la festivalo en Opava mi decidis nur lunde matene, ĉar vojaĝi al Most mi volis dumtage, ne nokte. Kaj montriĝis, ke dimanĉe vespere restis en Opava ankoraŭ kelkaj aliaj esperantistoj, do oni kunmetis du tablojn en restoracio kaj ni sidis tie, trinkis kaj babilis. Kaj rekte kontraŭ mi sidis D-ro Pumpr kun sia edzino. Ni ĉiuj prezenis nin kaj sekvis interesa babilado. La edzino de Pumpr ekzemple rakontis, kiel laborema li estas; kiam li venas posttagmeze hejmen, li tuj diras al ŝi: „Ne parolu al mi, mi ne havas tempon, ne parolu“ kaj sidigas sin al sia skribotablo kaj tuj laboras, tradukas kaj skribas en Esperanto.

Kaj D-ro Pumpr diris al tio esperantlingve, ke lia edzino ne scipovas Esperanton kaj entute ne interesiĝas pri ĝi. Sed tiam la sinjorino leviĝis kaj esperantlingve ŝerce riproĉis al sia edzo, ke li interesiĝas precipe pri Esperanto kaj pri tradukado, kaj ne ankaŭ pri la familio. D-ro Pumpr tiam ekmiris kaj tre mirigita li diris: „Vidu, ŝi parolas esperante! Ŝi sekrete ellernis la lingvon!“ Kaj li estis tre perpleksa. Ni ĉiuj ĉirkaŭe ridis, ĉar ni bone komprenis, ke estas nur spektaklo por ni preparita, ĉar li sendube instruis sian edzinon kaj ŝi parolis la lingvon bone.

Post tiuj du miaj renkontiĝoj kun D-ro Pumpr sekvis ankoraŭ la tria, sed ĉi-foje ne persona, sed nur perletera. En la 4-a numero de Starto de la jaro 1970 en la rubriko „Lingva Konsilanto“ aperis „Enkonduka ĉapitro aŭ pri la korekteco de la lingvo“ de D-ro Pumpr, kun promeso „Daŭrigote“. Bedaŭrinde en la sekvantaj numeroj de Starto la daŭrigo ne aperis. Tiam mi ekkuraĝis sendi leteron al la redakcio de Starto kun peto pri daŭrigo de la Lingva Konsilanto kaj samtempe mi prezentis lingvan demandon pri akuzativa formo de „unu“. En la 3-a n-ro de Starto de 1971 en la rubriko Lingva Konsilanto D-ro Pumpr respondis mian demandon per artikolo titolita „Ĉu UNU havas akuzativon?“. En la komenco li sciigas, ke li respondas al demando de J. P. el Most, en la teksto li skribas pri mi kiel pri „nia leganto“ kaj „nia amiko“, kio aparte ĝojigis min. Bedaŭrinde tio estis la lasta rubriko Lingva Konsilanto, kiu aperis en Starto. Post unu jaro D-ro Pumpr mortis kaj mi kun granda bedaŭro konstatas, ke mia unua lingva demando al li estis samtempe lia lasta lingva respondo en Starto. Kaj tio estis mia „tria renkontiĝo“ kun li.

Karaj gesamideanoj, mi dankas por via atento.

*Jiří Patera*

Miroslav Malovec

## Kiel estiĝis la traduko de Bapto de caro Vladimír

En la materialoj, restintaj post Tomáš Pumpr, konserviĝis lia ĉeĥlingva prelego „Bapto de sankta Vladimiro de Havlíček en Esperanto“, kiun li preparis por la kongreso, kiu okazis en septembro 1954 en Otrokovice. Interese estas, ke en la Historio de Kamarýt mi ne trovis mencion pri ĉi tiu kongreso, sed Pumpr ĝin atestas per granda komuna fotografiaĵo, kie la partoprenantoj tenas ŝildon kun surskribo „Z.K. ROH Svit Otrokovice Sjezd esperantistů 11.-12. září“, plue per du leteroj de František Omelka, kiuj invitas lin perelegi (datitaj en aŭgusto 1954) kaj fine per la prelego mem, kie estas skribite „skizo de prelego por esp. kongreso, okazonta en Otrokovice la 12-an de septembro 1954“.

Pumpr unue rakontas pri la vivo de Havlíček, pri la sorto de lia manuskripto, ke la poemo estis eldonita nur dudek jarojn post lia morto, poste la manuskripto perdiĝis kaj troviĝis nur en 1922.

En 1934 Ota Ginz, kiu kun Stanislav Kamaryt estis preparanta Ĉeĥoslovakian Antologion, invitis al kunlaboro ankaŭ junan Tomáš Pumpr, tiam 28-jaran tradukistan komencanton. Pumpr tre admiris la esperantigon de la dua kanto el la Bapto faritan de Stanislav Kamaryt. Ota Ginz petis unue Miloš Lukáš, ke li provu traduki la tuton, sed tiu rifuzis. Do li faris la saman peton al Pumpr kaj tiu provis. En 1935 estiĝis la unua versio de Pumpr. La perfektigadon de la traduko interrompis la milito.

En 1946 Pumpr tute reverkis la tradukon, sed ĝi restis en lia tirkesto. La asocio petis la ŝtatajn organojn permesi, ke la traduko aperu samtempe kun la *Riporto sub pendumila maŝo* de Fučík, kiu jam ricevis la permeson, sed poste estis ĉio nuligita. Pri la kialoj Pumpr silentas.

Komence de 1949 li sendis kopion de sia traduko kune kun sia traduko de Majo de Mácha al prof. Reto Rossetti, kiu vivis en Anglio. Rossetti aranĝis familian kulturan vesperon kun kelkaj amikoj kaj tie li tralegis ankaŭ la poemon de Havlíček. Poste li raportis al Pumpr: „Ĉiuj ĝuegis ĝin, ridante kaj ĝojante. Kaj en la fino Vilĉjo Auld diris: Tiu esp. poemo estas tute netradukebla en la anglan lingvon. Mi eĉ ne povas kredi, ke ĝi estus tradukebla ĉeĥen!“

Reto Rossetti post tri jaroj anoncis al Pumpr, ke li trovis eldononton, nome Juan Régulo Pérez en la urbo La Laguna sur la Kanariaj insuloj. Majstro Josef Lada permesis uzi liajn ilustraĵojn sen honorario.

La satiro estis plena de politikaj aludoj, kiuj estas ne tute kompreneblaj por la nuntempa leganto, tiom malpli por eksterlandanoj. Ekzemple en aliaj lingvoj ne estas la vorto „paragrafo“ uzata kiel metaforo por leĝoj, kiel ĝin uzas ni ĉeĥoj. Pumpr devis trastudi enciklopediojn por informiĝi pri la skismo inter la orienta kaj okcidenta eklezioj kaj pri la rusa kronikisto Nestor, kiu priskribis legendon pri la kieva princo Vladimiro, kiu ĵetigis en Dnepron statuon de la slava dio Peruno. En unu strofo Havlíček parolas pri Franta Šumavský kaj kamarilo de virina sekso.

Zachovej nám, Pane Bože,  
Frantu Šumavského,  
že je každá kamarila  
pohlaví ženského.

Kamarilo estas intrigantaj korteganoj, sed kiu estis Franta Šumavský kaj kion celis Havlíček per tiu mencio? Šumavský estis vortaristo, kies vortaro germana-ĉeĥa aperis en 1847. Pumpr pruntis la vortaron kaj trovis, ke ĉe ĉiuj substantivoj Šumavský indikas gramatikan genron, nur ĉe kamarilo li forgesis la indikon. Havlíček do atentigas, ke kamarilo estas de virina genro kaj uzas virinajn ruzaĵojn.

Alia strofo skribas pri „kacík“ en Hessen-Kassel.

Vladimír byl ještě k tomu  
puncto sexti štvaneč,  
jako lev kraloval mužům  
a ženským co kanec.



Ještě kromě těch kasáren  
leckdes filiálku:  
Kacik v Hessen-Kasslu nemá  
tolik kafešálků!

Ĉeĥa komentario asertas, ke verŝanje temas pri familia nomo de iu fabrikisto en la germana urbo Kassel en la provinco Hessen. Pumpr kaj Ginz skribis al la direktoro de la urba biblioteko en Kassel, petante, ĉu li povus esplori, ĉu en la mezo de la 19-a jarcento ekzistis en la urbo firmao de tiu nomo. La respondo estis, ke la urba historiisto traesploris liston de tiamaj firmaoj kaj povas konfirmi, ke tia firmao ne ekzistis. Poste Pumpr trovis mencion de Pavel Eisner, ke „kaciko“ estis indiana princo. Pumpr sekvis tiun spuron kaj malkovris, ke en Hispanio oni transprenis tiun vorton en la senco de politika agitisto kaj en 1850 ĝuste Havlíček uzis ĝin samsence en sia ĉeĥlingva ĵurnalo. Havlíček aludas la princon-elektiston Vilhelmon la II-an el Hessen, kiu estis en la tuta Eŭropo misfama pro siaj amoraj skandaloj, kaj asertas, ke Vladimiro eĉ lin superis per siaj amoraj skandaloj.

Pri la esprimo „šulem, šulem“ asertas ĉeĥaj komentarioj, ke Havlíček imitas judan ĵargonon per elpensitaj vortoj. Sed Pumpr eksciis, ke la orientaj judoj tiel prononcas la faman satulon „ŝalom“, kiu signifas trankvilon kaj pacon.

Do la Esperanta komentario klarigas multajn ĝis tiam neklarajn lokojn en la poemo.

Pumpr skribas, ke lia celo estis uzi lingvaĵon popolan, sen poeziaj ornamaĵoj, paroleblan kaj krudan, fluantan kiel folkloraj kantoj, kaj tamen ne cedi pri reguloj de Esperanta poetiko kaj ne peki per licencoj. Solvojn de unuopaj strofoj li prezentadis al Reto Rossetti, kiu estis senlaca kritikanto kaj konsilanto, ofte estiĝis pluraj versioj de unu strofo kaj ili diskutis pri ĝi dum pluraj monatoj. Kredu-ne kredu, la plej malfacila estis la strofo unua, Rossetti fine elektis el 15 versioj, kiujn Pumpr prezentis.

Kiam la libro aperis kaj komencis disvendiĝi tra la mondo, la Hispana Esperanto-Asocio energie protestis kontraŭ la „senpia kaj malmorala satiro“ kaj postulis, ke la eldonisto tuj likvidu la tutan eldonon. En Hispanio tiam regis diktaturo, apoganta sin je eklekzio, tial la hispanaj esperantistoj timis, ke la libro povus esti preteksto por persekuti Esperanton kaj esperantistojn. Pérez la eldonon ne likvidis, sed promesis, ke en Hispanio li vendos eĉ ne unu ekzempleron kaj la vorton li ne rompis. Tamen la skandaleto estis bona propagando de la libro en aliaj landoj kaj la libro rapide disvendiĝis. Samtempe oni multe skribis pri Havlíček.

Pumpr mem ricevis 6 aŭtorajn ekzemplerojn, kiujn li disdonis al amikoj. Kiam li volis aĉeti pluajn ekzemplerojn, montriĝis, ke tio ne estas ebla. Monopola importanto de eksterlandaj libroj estis Artia kaj tiu ne permesis foruzi valutojn por Esperanta libro.



Unu ekzempleron Pumpr sendis kompreneble al Josef Lada. Konserviĝis la letero, en kiu li petas Majstron pri la pardono, ke la koverto de la libro estas fuŝita de iu profesia grafikisto Jack Hartley el Manchester. La grafikisto pentris novan bildon, imitante la stilon de Lada, sed ne tute bone. En la libro estas per malgrandaj literoj skribite, ke la koverto estas laboro de Hartley, sed la legantoj tion preteratentas kaj opinias, ke temas pri la verko de Lada. Pumpr tion konstatis, nur kiam li ricevis jam eldonitan libron kaj ne povis tion ŝanĝi. Malgraŭ tio Lada estis volonta subskribi cent titolpaĝojn, kiujn sendis al li s-ro Pérez pere de Pumpr, tiuj poste estis uzitaj por cent luksaj bibliografiaj eldonoj. Reto Rossetti sendis al Josef Lada katalogojn de pluraj nederlandaj firmaoj, kiuj produktis altkvalitajn penikojn kaj farbojn por pentristoj, por ke la Majstro povu elekti. Mi supozas, ke li poste aĉetis por li la elektitajn materialojn, sed pri tio mi ne trovis leterojn.

Tomáš Pumpr korespondis rilate kun Havlíček kun pluraj gravaj personoj, precipe kiam li serĉis respondojn je neklaraj lokoj en la poemo, kiel mi jam menciis supre. Estas inter ili literaturisto Pavel Eisner, kun kiu li korespondis pri „kaciko“ kaj informis lin pri sia hipotezo, ke temas pri Vilhelmo la II-a. D-ro Jaromír Bělič, rektoro de la pedagogia altlernejo en Olomouc, aŭtoro de la komentarioj en la ĉeĥaj eldonoj, korespondis kun Pumpr pri la tiklaj lokoj kaj dankis, ke Pumpr

havigis al li kopion de la pola traduko de la poemo. Pri la biografio de Havlíček multe helpis D-ro Havel, direktoro de la instituto por la ĉeĥa literaturo. Kaj kompreneble Pumpr korespondis kun nultaj esperantistoj (Vondroušek, Vaněk, Fousek, Šustr, Lukáš k.a.) pri la libro.

Mi jam menciis, ke en Ĉeĥoslovakio mem estis problemo disvastigi la poemon. Iu, ŝajnas al mi ke Ludvík Chytil, faris samizdatan eldonon de pluraj ekzempleroj per infana presilo, tio estis guma ludilo. Sed fine ĝi aperis en 1967 en la ĉeĥoslovakia eldono de Paco kaj poste kiel depresajo en formo de malgranda memstara broŝureto. En 1996 la brazila eldonejo Fonto aperigis spegulan eldonon ĉeĥan-Esperantan.

Konserviĝis ankaŭ ĉeĥlingva letero de Pumpr al Jaroslav Šustr el februaro 1957, kiam ili intencis prepari ekspozicion pri la Esperanta eldono de la Bapto. Ili jam ricevis konsenton de la ministerio de poŝtoj, ke en la halo de la ĉefa poŝtejo en Prago ili ricevos vitrinojn, sed en julio la ministerio sciigis, ke ili devis disvastigi siajn servojn por la publiko kaj tial ili devas rezigni pri ĉiuj ekspozicioj en la halo. Tamen la plano de Pumpr pri la ekspozicio estas interesa. Sur la ĉefa panelo devis esti granda portreto de Havlíček kaj teksto, kiel malfacile lia verkaro penetras en la mondon, sed Esperanto sukcesis interesigi plurajn gravulojn, kiuj prizorgis la eldonon sur la Kanariaj insuloj. Por la unua vitrino li planis ĉeĥlingvajn eldonojn de Havlíček kun ilustraĵoj de Lada kaj novan eldonon el 1956, malfermitan sur la paĝo 148, kie estas mencio pri la Esperanta eldono kaj la hipotezo pri „kaciko“. Plue li volis meti tien ĉiujn eldonaĵojn de Stafeto, inter kiuj aperis ankaŭ la Bapto. En alian vitrinojn li intencis meti Ĉeĥoslovakian Antologion, unu fermitan, unu malfermitan sur la paĝo, kie troviĝas la dua kanto de Bapto en traduko de Kamaryt, poste gazeton Ligilo n-ro 10 el 1939, kie aperis la tria kanto, fine la ceterajn esperantlingvajn tradukojn el la ĉeĥa lingvo. Plie li aldonus japanajn tradukojn de Avineto kaj de Muta Barikado kaj ĉinajn tradukojn de Bezruč, kiuj estis faritaj pere de Esperanto. Sur la duan panelon li metus mapon de la okcidenta Afriko kun la Kanaria insularo, poste mapon de la insulo Tenerife kun la urbo La Laguna kaj portreton de Juan Régulo Pérez. Tria panelo: mapo de la mondo kun indikitaj lokoj, kie aperas esperantlingvaj gazetoj, kiuj presis recenzon pri la libro. Kvara panelo: la menciitaj gazetoj, malfermitaj sur la paĝo kun la recenzo. La lasta vitrino: la esperantlingva eldono de la Bapto, unu bindita, unu dismetita je folioj, por ke oni povu legi la poemon kaj la komenton.

En la leteroj de Pumpr estas ankaŭ satira poemo de Štefo Urban pri la recentistoj de la traduko.

### **BAPTO DE CARO VLADIMIR**

Aldono dediĉata al la eklezie dogmemaj  
Esperantaj recenzistoj

Kiam CARO VLADIMIRO

en la pres' aperis,  
Esperantaj recenzistoj  
kandelon oferis;

Eldonisto kaj aŭtoro  
je blasfemo pekis.  
(krome oni en la libro  
kraĉas, ja eĉ f..is)!

Tondru, Di', al tradukinto,  
fulmojn vi ne ŝparu!  
lezis li la religion,  
juĝon kun li faru .

Sendu la Inkvizicion  
kontraŭ tiu ĉeĥo;  
de l' ŝtiparoj mezepokaj

*resurgator eĥo!*

Punu, Dio, la kanajlojn.  
ambaŭ tre severe!  
Ilin ni (*nomine tuo!*)  
malebligos. Vere.

Ja ne ĉiu literaĵo  
estas la samspeca:  
Sed la BAPTĉ DE VLADIMIRO -  
estas herezeca !!!

## **MARŜO DE PIAJ RECENZISTOJ**

**Gloria in excelsis Deo -**  
Pérez kaj Pumpr al pereoj!

**Te Deum laudamus -**  
ni ilin tuj damnus.

**Libera nos a malo -**  
ja bolas nia galo ...

**Oramus fratres -**  
Pumpr kaj Pérez!

**In te Domine speravi -**  
versojn ni ne bezonas havi.

**Dignum et justum est -**  
ekstermi sen la restĉ!

**Sanctus, sanctus, sanctus -**  
Pumpr arogantus ...?

**Dona nobis pacem -**  
nur ne tro aŭdace!

**Gratia tibi Domine -**  
librojn jes, tiajn ne!

**Saecula saeculorum amen -**  
Ni savos Esperanton tamen!!!

Urban leden 1954

Margit Turková

## 18-a kultura festivalo en Ústí nad Labem

(Omaĝe al Jiří Kořínek kaj Dr. Tomáš Pumpr)

Unue ni metu la „Lastan bukedon“ – al Dr. Tomáš Pumpr.

*De ni foriris viro tia,  
da kiaj rare inter ni,  
modesta, dokta, multescia,  
plena de krea energi' .*

*Majstro de lingvo kaj poeto  
kaj antaŭ ĉio nobla hom' ,  
kiu en dura sortoknedo  
restis heroldo nur de bon' .*

*Labor-konsult' kun lia klero  
bonŝanco estis kaj profit' :  
ĝis kern' subtila de l' afero  
penetris sci' de l' erudit' .*

*Poemtradukojn kiu legis.  
en lia majstra versa rob'  
jam spertis, ke ĉe li grandegis  
arto kaj scio en duop' .*

*Li, jurdoktoro, lingvojn konis,  
mirinda estis lia sci' ,  
el sia stok' li riĉe donis  
kaj el ĉi font' plu ĉerpos ni.*

*De edzo, patro, de amiko  
ekzemplo estis li model' ,  
kvazaŭ lin pentrus di-peniko,  
inter ni homoj hom' juvel' .*

*Ne korpe granda, sed anime,  
senlace disdonanta sin,  
vi ekkoninte lin intime  
devis admire ami lin..*

*Nin ĉiujn perdo peza trafas:  
la plej kapabla pasis for,  
konsolon solan plu ni havas  
en lia verk' , en rememor' !*

**Jiří Kořínek, 11.9.1972**

Jes – versoj jam sonis... Nun ni trairu al ioma prozo, el la plumo de ĝuste omaĝita aŭtoro – de Tomáš Pumpr. En la eseo PYGMALION de Bernard Shaw ni memorigu lin ne kiel nur verkanton kaj tradukanton, sed kiel admiranton de alies verkokapablo. Li eksplikas tion jene:

### *Pygmalion de Bernard Shaw*

*La 26-an de Julio ĵus pasis cent jaroj de la naskiĝo de la mondfama angla verkisto*

*George Bernard Shaw. (1856 – 1950), aŭtoro de multaj verkoj prozaj kaj dramaj, sprita komentisto de la nuntempo kaj ŝatata satiristo, kiu turnis la pikilon de sia morda moko kontraŭ la filistra pensmaniero de la samtempuloj. Kiam li antaŭ nelonge mortis en la aĝo de naŭdek ses jaroj, li estis jam ĝenerale agnoskata kiel genio; kaj tamen estas konate, ke liaj brilaj sukcesoj ŝuldiĝis ne nur al lia natura talento, sed ankaŭ al lia granda diligento kaj laboremo. Li ankaŭ devis longe peni, antaŭ ol la publiko dediĉis al li la merititan atenton.*

*Post kelkaj dramoj de morna atmosfero ekfajreris sur la scenejoj en la jaro 1914 lia unua granda komedio, kiu tuj katenis la publikon. Estis Pygmalion.*

*En ĝi la aŭtoro aludis la legendon de la greka mitologio pri la skulptisto Pygmalion, filo de Kilikos, reĝo de Kipro. Tiu ĉi enamiĝis en marmoran statuton de knabino, kiun li mem estis kreinta, kaj elpetis de diino Afrodite ties vivigon.*

*Ĉe Shaw okazas la epizodo jene: Higgins, profesoro de fonetiko, akceptas la taskon instrui malriĉan florvendistinon, nekulturitan infanon de la urba periferio. Li vetas kun sia amiko, ke li post ses monatoj tute aliformiĝos ŝin tiom, ke li povos ĉe diplomata festo prezenti ŝin kiel dukinon, kaj neniu ekkonos la falson. Lia eksperimento nepre sukcesis, sed li tute forgesis, ke li havas en siaj manoj ne mortan materion, sed vivan estaĵon kun homaj sentoj, kiu alte elkreskis trans la limoj de liaj intencoj.*

*En tiu ĉi komedio la aŭtoro pruvas la grandan veron: nome ke dukinojn kaj aliajn privilegiatojn de la naskiĝo kaj havo kreas nur la tajloro, la eduka dresado kaj la konversacia rutino; sed la vera valoro de homa animo povas sendistinge troviĝi eĉ en la plej kruda individuo.*

*Tiu ĉi verko de varme homa, serena etoso kaj esperplena optimismo garantias al Shaw renomon tra la tuta mondo kaj eĉ por malproksima estonteco.*

*La esperantista aktora kolektivo „Verda ĉaro de Julio Baghy“ en Praha post pluraj sukcesaj artvesperoj, intencante pliriĉigi sian repertuaron per bohnumora teatraĵo mondrenoma, elserĉis tiun ĉi komedion de Bernard Shaw. Estis elekto bonŝanca, kaj la prezento, okazinta en Praha la 4-an de Junio 1956 estis io pli, ol simpla samideana teatra vespero. La verko nome enhavas ne malmultajn malfacilaĵojn, kies superado estas rimarkinda ankaŭ el literatura vidpunkto.*

*Eliza Doolittle, la heroino de la komedio, parolas ja en la unuaj scenoj teruran periferian lingvaĉon, gramatike kriplan kaj fonetike netolereblan, kaj nur poste ŝi ellernas bonajn gramatikajn formojn kaj korektan elparoladon, kvankam en la elektado de la „salon-taŭgaj“ esprimoj ŝi longe sin ne sentas sur firma grundo. Do, la deformato de la lingvo rolas en Pygmalion gravan funkcion; kaj tamen Esperanto ne posedas „veran“ ĵargonon, kiu estus tiucele uzebla. Kiel el la situacio?*

*La tradukintino Eva Scharová solvis la problemon en interesa maniero: ŝia Eliza (kiun ŝi cetere mem rolis) parolas primitivan Esperanton, gramatike fuŝan, preskaŭ sen akuzativo, kian ni renkontas ĉe la eternaj komencantoj; kaj prononcas ĝin en la malzorga maniero, kie parolas la homoj sur la periferio de la socio eble en ĉiuj urboj de la mondo: „Majora moŝto, aĉetu floroj de malriĉa floristino! – Ne ventolu la buŝo! – Mi ne havas gepatroj, ili puŝis min tra la truo – Mi havas same bonaj sentoj kiel iu alia...“ Ankaŭ la inventaĵo de Reto Rossetti, la frenezeta profesoro Klapelkap, venis al sia honoro: Eliza forpuŝas la planojn de Higgins jene: „Mi iras for. Ŝajnas, ke io fantomas en lia cerbo. Mi ne bezonas, ke min instruu ia Klap-el-kapo.“ (Originale: „I’m going away. He’s off his chump, he is. I don’t want no balmies teaching me.“)*

*Kiam Eliza estas enkondukata la unuan fojon en la rigoran societeton ĉe sinjorino Higgins, ricevas severan ordonon konversacii nur pri la vetero kaj bonfarto de la ĉeestantoj. Nu, ŝi sukcesas en zorge kaj klare artigata parolo fari prelegon pri la meteorologia situacio, sed poste, kiam oni komencas interparoli pri la gripo, ŝokas la bonajn sinjorinojn per sia buntkolora priskribo: „Mia*

*onklino mortis je gripo. Almenaŭ oni tion pri ŝi diras. Sed mia opinio estas, ke oni la maljunulinon forkras.*“ („But it's my belief they done the old women in.“) Kaj la kompatinda profesoro Higgins devas rapide klarigi, ke „forkraki“ estas nova konversacia termino signifanta „mortigi iun“.

*Ĉe la adiaŭo kun la societo Eliza malakceptas la proponon de Freddy, kiu volis ŝin akompani, kun perfekte eleganta dirmaniero: „Mi veturas per taksio. Sur vian promenon tra la parko mi fajfas.“* („Walk! Not bloody likely! I'm going in a taxi.“) En la pliaj stadioj de sia edukado Eliza jam nur iam-tiam ekhezitas, ekzemple ĉu diri „komenci“ aŭ „komenciĝi“, k.s.

*Tiuj ĉi specimenoj povas doni imagon pri la iam certe diskutebla, sed ĝenerale bonsukcesa traduklaboro uzita.*

*Notinda estas ankoraŭ la figuro de patro Doolittle, la cindroportisto. Ĉe li la tradukintino ŝparis la ĵargon-diraĵon kaj lasis lin plejparte paroli en bona popole konversacia Esperanto; tamen li, „natura oratora fenomeno“, ŝatas miksi en sian parolon trafajn kaj reliefajn metaforojn, ekz. „Se volas vi, via moŝto, iom ekzaliti ŝian moralon, do apliku rimenon.“*

*Mi volis hodiaŭ paroli nur pri la lingva kaj literatura flanko de la uzita Esperanta teksto de Pygmalion. El la cetero mi mencias nur, ke la teatra kolektivo „Verda ĉaro“ prezentis la teatraĵon kiel tutvesperan ludon, tute en la aranĝo, kiel ĝin kutime prezentas la grandaj scenejoj, kun ĉiuj dram-personoj. La vespero alportis grandan plezuron al ĉiuj spektatoroj, kaj ni volas esperi, ke baldaŭ pli larĝa internacia publiko havos okazon vidi, aŭdi, ĝui kaj juĝi tiun ĉi klasikan komedion en Esperanto.*

Jen la eseo, kiu estiĝis „ponto“ por menci la verkon „Pigmaliono“, kiel ĝin Esperante titolas la tradukintino – kaj samtempe la ĉefa rolulino Eva Seemannová (en la eseo de T.P. ŝi ankoraŭ estis Suchardová) kaj la teatro-kolektivon „VERDA ĈARO“. Kompreneble, ke ilia revo estis prezenti sin tiel, ke pli granda publiko „aŭdu, ĝuu kaj juĝu“ la entreprenon, kiel sin esprimis T.Pumpr.

Kaj tio okazis. Ilia revo plenumiĝis; kaj nun ni uzu la informojn de s-ano Kazimjeŝ Ŝĉurek, kiu citas el kortuŝaj rememoroj de Eva.

„Ni sentis nin feliĉaj kaj fieraj, kiam la pola ministerio por kulturo invitis nin prezenti Pigmalion-on en Varsovio dum la Universala kongreso. Ja, por la unua fojo ni estis prezentotaj ekster nia propra lando. Kiam post diversaj limaj perturboj ni venis al Varsovio kaj eniris la kulturdomon, ni teruriĝis. Ni kutimis ludi sur la malgrandaj scenejoj, kaj jen tia scenejo havas dek ses metrojn. Mi finfine estis aktorino, sed miaj kunludantoj estis amatoroj. Por ili estis vere malfacila tasko paciĝi kun tia spaco. Nu, la prezentado vere sekcesis, tion vi ja scias. Jam post la unua sceno de Eliza la aŭskultantaro entuziasme aplaŭdis; mi forkuris el la scenejo kaj ŝajnis al mi, ke mi devas halti kaj surgenui danki por tiu unua aplaŭdo, ĉar ĉeestis proksimume kvar mil spektantoj el 34 landoj, kaj ĉiuj komprenis, ĉiuj aplaŭdis. Tre kortuŝita mi estis...“

*Post kiam la prezentado finiĝis, mi ricevis grandegan bukedon de longegaj malhelaj, viole ruĝaj gladioloj. Ĉiuj estis eble pli longaj ol mi mem. Mi staris sur tiuj dek ses metroj de la scenejo, kaj la amfiteatro aplaŭdis, aplaŭdis kaj mia gorĝo estis prempresita, mi volis ridi, sed grandaj larmoj de feliĉo deruliĝis desur miaj vangoj, kaj mi estis feliĉega, pli, ol eblas diri. Jes, tian travivaĵon oni neniam forgesas“.*

Karaj geamikoj,

dum longaj jaroj senlace liveradis Eva al ni noblajn kortuŝajn sentojn, ĉiujn en belega „lingva pakaĵo“ ĉu el sia memo, ĉu el plumo de aliaj verkistoj. Nun vi, Eva, fine ripozu, ĉar viaj admirantoj staras vice kaj emas esprimi siajn sentojn al vi, volas omaĝi vin:

## **Eli Urbanová**

*Vidi ŝin sveltan sur podio  
estadas ĝuo. Mia dio,  
ŝi pezas kvardek kilogramojn!  
Eva! Ŝi konis miajn amojn.  
Eva, mi emas vin brakumi...  
Novaĵo! Eva ĉesis fumi!  
Eva, vi ino nekredebla,  
tiel subtila, sed ne febla,  
mi ŝatus havi vian forton,  
mi pensus vivon kaj ne morton...*

## **Karolo Piĉ**

*Do Eva Suchradová pravas.  
La vivo estas pantomimo.  
Tial ŝi estas aktorino  
kaj rolojn mil kompanse havas.*

*Vespere ŝi publikon ravas  
per proza dram' aŭ drama rimo.  
Do Eva Suchardová pravas.  
La vivo estas pantomimo.*

*Por ŝi la Verda Ĉaro gravas.  
Ŝi rolas kiel principidino.  
Tamen eĉ tie estas limo.  
Fine la vangojn larmoj lavas.*

*Sed Eva Suchardová pravas.*

## **Miloš Lukáš, en la jaro 1955:**

*Neniam mi forgesos  
pri la ĉijara marto:  
eterne min impresos  
la sorĉ' de via arto!*

## **Jiří Karen**

*... estimata kaj ŝatata Eva,  
mi ĝojas, ke ni interkompreniĝis reciproke kaj estiĝis amikoj. Mi opinias, ke komuna laboro sur iu bona kaj homa tasko kunigas homojn pli forte ol io alia. Plue mi opinias, ke sur la tero homo havas nenion pli valoran, ol kelkajn laboremajn kaj bonajn amikojn, kun kiuj oni kompreniĝas, kaj al kiuj oni sin apogas. Mi deziras, ke ĝuste tia rilato estu bazo de nia amikeco kun vi, kaj kun aliaj esperantistoj, kiuj havas la saman intereson – la poezion kaj emon al la lingvo, kiu kapablas la homojn kunigi per amikecaj kontaktoj...*

**Jiří Kořínek, 21.19.1979**

*... fine mi volas mianome kaj per ni ĉiuj refoje danki por via perfekta kaj superba prezentado. Ŝparu vian sanon, reduktu vian fumadon kaj ĉion, kio vin nocas. Pardonu mian bonintencan mentoradon, mi petas... Vi estas por ni tre valora!*

**Aldono I:**

## **Verkaro de Jiří Kořínek**

**BÁR, Zdeněk:**

Arbo, Mskr. 1980. Orig.: Strom

**BENDL, Karel:**

Majo - Arbasra sceno Máj. Mskr. - propra muzikigo. Orig.: Lesní scéna

**BENEŠ, Pavel:**

La Manoj. Mskr. Orig.: Ruce

**BENIAK, Valentín (1894-1973):**

Maljunulineto. Slovaka Antologio 1977, p. 300; Orig. Starenka

**BEZRUČ, Petr (1867-1958):**

Sileziaj kantoj. Tr. Tomáš Pumpr, Rudolf Hromada. Jiří Kořínek, eld. Opava 1970; Orig.: Slezské písně

Bernard Žár. La Suda Stelo, Ljubljana 1958, broŝuro Petr Bezruč 1867-1958

**BLODEK, Vilém (1834-1874):**

Reveno de Migrulo. Mskr.

**BOČKOVÁ, N.:**

Psika forto. Mskr. Orig.: Psychická síla

**BODE, Angela:**

Rememoroj pri Bohemio (Starto 4/1990, p. 1-2)

**BORSKÁ, Ilona:**

Sonĝo. Mskr. Orig.: Sen

**BRADÁČ, Karel:**

Furore ek! Mskr.

**BRANISLAV, František (1900-1968):**

Appassionata de Beethoven. Mskr.

Koturno. Mskr. Orig.: Křepelka (muziko I. Hurník)

Kristnaska. Starto, 8 (46) 1974; Orig.: Vánoční

Paco. Paco 128-129, 1964; Starto 2/1974, p. 1; Orig.: Mír

Rememoro pri Norvegio. (Fonto 17/1982, p. 4). Orig.: Vzpomínka na Norsko

**BŘEZINA, Otokar (1868-1929):**

La Amo. Mskr. Orig.: Láska

Bedaŭro. Mskr. Orig.: Lítost

Eterne denove. Panoramo-Vitreroj 1976, p. 72. Orig.: Věčně znova

Ho forto de ekstazoj kaj revoj. Mskr. Orig.: Ó sílo extasí

Kiam el via amo. Mskr. Orig.: Když z lásky tvé

Kun morto parolas mortanto. Mskr. Orig.: Se smrtí hovoří umírající

Manoj. Mskr. Orig.: Ruce

Mia patrino. Mskr. Orig.: Moje matka

Milkore kantas via kor'. Mskr. Orig.: Tisíce srdcí pělo v srdci tvém

Matena preĝo. Mskr. Orig.: Ranní modlitba Březina O. Miloj da steloj estingiĝas. Mskr.



Orig.: Hvězd hasnou tisíce

**Mistero de doloro.** Mskr. Orig.: Tajemství bolesti **Momentoj de gloro.** Mskr. Orig.: Chvilé slávy

**Nevenkeblaj ni kreskas.** Mskr. Orig.: Nepřemožitelní rosteme

**Ni salutas printempon.** Mskr. Orig.: Pozdravujeme jaro!

**Preĝo por la malamikoj.** Mskr. Orig.: Modlitba za nepřátele

**Preĝo vespera.** Mskr. Orig.: Modlitba večerní

**Rondokanto de koroj.** Mskr. Orig.: Kolozpěv srdcí

**Somera solstico.** Mskr. Orig.: Letní slunovrat

**Varmegoj.** Mskr. Orig.: Vedra

**Vi ne venis.** Mskr. Orig.: Tys nepřišla

**Virinoj.** Panoramo 1974, str. 17. Orig.: Ženy

**BUNČÁK, P.:**

**En la klasika lando.** Slovaka Antologio, str. 455. Orig.: V klasickej krajine

**CIML, Vlastimil:**

**Mia Prago.** Mskr. 1981. Orig.: Má Praha

**ČERVENKA, Miroslav:**

**Vi markis min jam por vi.** Paco, 123, 1964, p. 10

**DOSTÁL, K.-Lutinov:**

Plugisto Oráč. Mskr.

**DVOŘÁK, Antonín (1841-1904):**

**Bibliaj Kantoj.** op 99, n-oj 1-10. Mskr. Orig.: Biblické písně, op. 99, 1-10

**Ciganaj melodioj.** Mskr. Orig.: Cikánské melodie op. 55

**Jakobeno.** Mskr. Orig.: Jakobín (teksto: Červinková)

**Moraviaj Duetoj.** 32. Mskr. Orig.: Moravské dvojzpěvy (1, 6, 11, 13, 8, 10, 9)

**DVOŘÁČKOVÁ, Vlasta:**

**Surskriboj.** Mskr. Orig.: Nápisy

**DYK, Viktor (1877-1931):**

**La patrujo parolas.** Mskr. Orig.: Země mluví (tradukis Kořínek, Hromada, Pumpr - stencilaĵo)

**EBEN, Petr (1929-):**

**Truvera Meso.** Mskr. Orig.: Trovérská mše

**FABRY, Rudolf (1915-):**

**Sur la noktmeza maro.** Slovaka Antologio 1977, p. 385. Mskr. Orig.: Na polnočnom mori

**FELDEK, Lubomír (1936-):**

**Odo je kapturna tempo.** Slovaka Antologio, s. 518. Orig.: Oda na závratné tempo

**FISCHER, Otokar (1883-1938):**

**Post fintraduko de Faŭsto de Goethe.** Panoramo, Vitreroj, 1976, p. 84. Orig.:

**FLORIAN, Miroslav (1931-):**

**Hospitala sonatino.** Mskr. Orig.: Nemocniční sonatina.

**Februara neĝo.** Mskr. 17. 2. 1980. Orig.: Unorový sníh

**La Stratlampoj.** Mskr. 14. 3. 1980. Orig.: Pouliční svítilny

**La Tilioj.** Mskr. Orig.: Lípy

**HADJIDZKIS, M.:**

**Infanoj de Pireo** (Starto 6/1975, p. 16)

**HALAS, František (1901-1949):**

**Dek plagoj egiptaj.** Internacia Kulturo 1949-50? Orig.: Deset ran egyptských

**Božena Němcová.** Mskr.

**Okuloj oldvirinaj.** Mskr. Orig.: Oči starých žen

**HÁLEK, Vítězslav (1835-1874):**

**En la naturo.** Norda Prismo, 3/1965, p. 75. Orig.: V přírodě

**Peto de kantisto.** Mskr.

- Vi ĉiuj, kiujn premas sort'.** Mskr. Orig.: Vy všichni, kdo jste stísněni
- HAŠLER, Karel (1879-1941):**  
**La ĝardeno de Lobkovic.** Mskr.
- HAVLÍČEK BOROVSÝ, Karel (1821-1856):**  
**Konsilo.** (Tombo) Mskr. (Fonto 79, p. 31; Fonto 88, p. 19)
- HELD, Jan Theobald:**  
**La revido.** Mskr. Orig. Shledání
- HOLKOVÁ, Marie:**  
**Poemoj.** Mskr-
- HOLLÝ, Ján (1785-1849):**  
**Odo al Johano Gutenberg.** Slovaka Antologio, p. 80
- HOLOUBEK, Tomáš :**  
**Soldatulino.** Mskr.
- HORA, Josef (1891-1945):**  
**Ludi.** Mskr. Orig.: Hrát  
**Majo.** Fonto, 21, 1982/6, s. 16. Orig.: Máj
- HOROV, Pavol (1914-1975):**  
**Horbatado.** Slovaka Antologio, s. 401. Orig.: Časobitie  
**Slovaka panoramo.** Slovaka Antologio, s. 401. Orig.: Slovenská panoráma.
- HRDLIČKA-POLOLÁNÍK:**  
**Ritma Meso.** Mskr. Orig.: Rytmická mše
- HRUBÍN, František (1910-1971):**  
**Fabelo.** Panoramo-Vitreroj 1976, s. 82. Orig.: Pohádka
- HULENA, Vladimír:**  
**Al Markéta Procházková.** Mskr. 14.7.1984  
**Por ĉiuj tempoj daŭru pac'.** Mskr. Orig.: Na věky věků všem jen mír
- HURNÍK, Ilja (1922-):**  
**Dolĉamaro.** Mskr. Orig.: Potměchut
- HUS, Jan (1371-1415):**  
**Krist' Jesuo, bona patro.** Mskr. Orig.: Jesu Kriste, štědrý kněže
- JAHN, Metoděj:**  
**Valaĥio.** Informoj de Vsetín, 1973, s. 1. Orig.: Valašsko
- JANÁČEK, Leoš (1854-1928):**  
**Amo vera. Printempa kanto. Benketo.** Mskr. Orig.: Láska opravdivá. Jarní písen.
- JIRÁSEK, Alois (1851-1930):**  
**Lanterno** (fragmento). Mskr. Orig.: Lucerna
- JIRKO, Miloš:**  
**La sepa de marto.** Mskr. Orig.: Sedmý březen
- JULÍNEK, Josef:**  
